

# Zagreba Esperantisto

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Ĉi-numere legu pri:  
**LA JUBILEO SUR NIA SOJLO**  
**TRATEMPA VOJAĜO AL LA JARO 1908**  
**EŬROPA UNIO - KROATIA STRATEGIA CELO**  
**HOTELO "ESPERANTO" EN SELCE**  
**ZAGREBO - LA ĈEFURBO**

Kastelo Veliki Tabor -  Josip Plečadin

1

2007

## Eldonanto:

*Grafokom, Đurđevac*

## Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

*Radenko Milošević  
Goljak 43, HR-10000 Zagreb  
Kroatio*

## Redaktejo kaj ekspedejo:

*Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr*

## Redakcianoj:

*Marica Brletić, Snježana  
Habulin, Vida Jerman, Jozo  
Marević, Radenko Milošević,  
Velimir Piškorec, Josip Pleadin*

## Presis:

*Grafokom, Đurđevac*

## Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro). En 2007 aperos kvar numeroj.

## Jarabono por 2007:

**en Kroatio:** 50,00 kunaĵoj al ĝirkonto de "Grafokom"  
2360000-1100925404

**alilande:** 10,00 eŭroj al UEA-konto: plea-k

**Viajn tekstojn** sendu al nia retadreso ĉi-sube, aŭ al la persona adreso de la redaktoro.

## RESUMO

En la milita jaro 1992 senvoĉe, kiel unu el la militviktimoj, estingiĝis post la 56-a aperinta numero, "ZELano", gazeto de Zagreba Esperanto-Ligo, kiu dum plenaj ses jaroj portis informojn pri Kroatio kaj Zagrebo, pri esperantistoj kaj kulturo al ĉiuj mondo-anguloj. Preskaŭ samtempe ĉesis aperi ankaŭ la sola kroata Esperanto-gazeto pri literaturo kaj kulturo, kiu sub la titolo "Koko" aperadis en Đurđevac. Nuntempe, dekkvin jarojn poste, "Koko" kaj "ZELano" kokerikas kune, kaj sub la nomo "Zagreba Esperantisto" daŭrigas la tradiciojn de la du gazetoj. Laŭ la protokolo de la Prezidantaro de Kroata Esperanto-Ligo de la 14-a de septembro 2005, la Prezidantaro akceptis la ideon pri renovigo de Zagreba Esperanto-Ligo kun intenco, ke ĝi denove estu membro de KEL. Samtempe estis konkludite, ke oni subtenas eldonadon de "Zagreba Esperantisto", se tio eblas. Bedaŭrinde, samtempe estis protokolite, ke "Kroata Esperanto-Ligo ne estas kaj ne povas esti fondinto de zagreba Esperanto-revuo kaj tia projekto ne povas esti en la programo de Kroata Esperanto-Ligo, sed se estos ricevitaj monrimedoj por la revuo, Kroata Esperanto-Ligo transdonos la rimedojn al la membro de KEL kiu zorgos pri la revuo."

Oni povus prave demandi: Kial ĝuste nun ekaperas "Zagreba Esperantisto"? Eĉ pli frue okazis preparoj, ne mankis rimedoj kaj kunlaborantoj, sed aktualas du tre gravaj eventoj: la traktado pri aliĝo de Respubliko Kroatio al Eŭropa Unio kaj la centjara jubileo de Esperanto enlande. Ili ambaŭ devas esti ĝustatempe prezentitaj en la Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor (Slovenio) dum julio ĉi-jare kaj en la Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo (Japanio), tuj poste.

La revuo ekaperas sub provizora eldonŝildo de "Grafokom". Ĉar la preparoj por (re)fondo de Zagreba Esperanto-Ligo komenciĝis, post kiam ZEL ekfunkcios, la eldontoŝanĝo transprenos ĝi mem.

En la aktuala numero vi povas legi pri la jubileo antaŭ nia sojlo, pri streboj de Kroatio por aliĝi al Eŭropa Unio, vi ricevos manplenon da utilaj informoj kaj raportoj, iom da literaturaĵoj, kaj plua evoluo de la enhavo dependos certe de la eldonanto, sed multe pli de la legantoj, kies kontribuajojn ni senpacience atendos. Diversspecaj reagoj, kritikoj kaj laŭdoj estas bonvenaj.

La 2-a numero aperos en julio, kaj do, rapidu sendi al ni viajn komentojn kaj kontribuajojn.

Sincere al vi deziras bonan legadon

*La redaktoro*

# LA JUBILEO ANTAŬ NIA SOJLO (el vidpunkto de historiisto)

Ĉar proksimiĝas la 100-jara jubileo de organizita laboro por Esperanto landnivele, mi estis petita esprimi mian opinion pri tiu temo. Kvankam la datoj faras konfuzon, fakte temas nur pri kvintaga diferenco: ĉu la 28-a de decembro 1908 aŭ la 2-a de januaro 1909. Ne ekzistis problemo, se ĉio estus okazinta en la sama jaro, sed la gravegaj eventoj okazis ĉe jarŝanĝo.

Per atenta legado de notoj de la du ĉefaj personoj tiutempaj (Mavro Špicer kaj Danica Bedeković) mi trovas la jenon:

Pri la kunveno kunvokita de Mavro Špicer, li mem skribis en siaj rememoroj ("La Suda Stelo" n-ro 4/1932, p. 44):


"Estinte aktiva oficiro kaj krome okupiĝante pri verkista laboro mi aperigis en la monato aŭgusto 1908, en la tiam plej populara gazeto *Obzor* artikolon "Esperanto", per kiu mi al la legantaro klarigis la fenomenan ideon de l' Esperantismo, ties fundamentan esencon, fine la belecon kaj facilan ellerneblecon de la lingvo Esperanto. Sendinte tiun artikolon al la aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof mi ricevis de li jenan respondon:

Varsovio 27/8 1908.

*Kara S-ro! Vian leteron kaj ankaŭ la gazeton mi ricevis kun plezuro kaj danko. Mi esperas, ke dank' al Via energia laborado nia afero baldaŭ havos en Kroatujo tre multe da amikoj. Via*

D-ro Zamenhof.

Tom poste mi aperigis en la hejma gazetaro alvokon por kunveno, kies celo estus interkonsiliĝo pri fondo de esperantista klubo. Pro diversspecaj malfacilaĵoj la kunveno okazis nur la 28-an de decembro 1908.



En ĝeneralaj trajtoj mi parolis pri la celo de esperantista movado: faciligo de ĉiuspecaj rilatoj interpopolaj, atingo de internacia paco kaj nacioj kaj fratigado de diverspopolaj membroj de la homaro.

La efika parolado eĥe resonis en la tuta multnombra ĉeestintaro, precipe post mia deklaro, ke mi Esperanton ellernis sen instruisto post dekkvartaga studado. **Tuj estis fondita la "Unuiĝo de kroataj esperantistoj". Aklame estis elektita la estraro. Kiel prezidanto estis mi elektita kaj vicprezidantino iĝis s-ino Danica Bedeković.**

La telegramsaluton al Zamenhof li respondis:

"Varsovio 29/XII 1908.

*La organizantojn de la unuiĝo de kroataj esperantistoj kore dankas por ilia saluto D-ro Zamenhof.*

La 2-an de januaro 1909 komenciĝis por kvindek geanoj la unua Esperanta lernokurso gvidata interŝanĝe de la prezidanto kaj vicprezidantino."

En la ĉi-supra teksto troviĝas atesto de persono, kiu mem estis la unua inter la unuaj (do, pli frua ol Danica Bedeković, kiu kiel ĉefredaktoro atestas pri la sama afero en *Kroata Esperantisto* 1/1909 alimaniere). El atesto de Špicer ni precize scias, ke **tuj** (do la 28-an de decembro 1908) fondiĝis UKE, kaj ke jam tiam Špicer estis elektita ĝia prezidanto. Konfirmas tion ankaŭ la preciza dato de la poŝtkarto de Zamenhof (la 29-an de decembro 1908). Lau Špicer, la 2-an de januaro 1909 nur komenciĝis la unua kurso, kaj ne okazis aparta fondkunveno. Eble tiu dato estis poste prenita kiel oficiala dato de la fondiĝo, sed la fondiĝo, laŭ mi, okazis kvin tagojn pli frue.

En "Kroata Esperantisto" (n-ro 1/1909, p. 1-6) pri tiu temo skribis Danica Bedeković, bedaŭrinde sen subskribo de



la teksto. La samajn aferojn ankaŭ ŝi menciis. Menciita estis la unua poŝtkarto de Zamenhof al Špicer (do, tiu de la 27-a de aŭgusto 1908), sed ĉi-foje ĝia teksto estis represita sen dato. Daŭrigante tiun tekston, la redaktorino skribis:

“La granda majstro ne trompiĝis. Dum mallonga tempo la intereso por Esperanto ankaŭ ĉe ni disvastiĝadis kaj de tago al tago fariĝis pli granda kaj ĝenerala, tiel, ke jam en novembro 1908 povis aperi la unua kroate ŝkribita Esperanta lernolibro de Mavro Špicer, per kies penado la 2-an de januaro 1909 fondiĝis la unuiĝo de kroataj esperantistoj.

El la unua ĉefkunveno estas sendita al la D-ro Zamenhof korega saluto, je kiu la prezidanto ricevis tiun ĉi respondon: “La organizantojn de la unuiĝo de kroataj Esperantistoj kore dankas por ilia saluto D-ro Zamenhof.” Kelke da tagoj poste aperis la unua Esperanta lernokurso sub la direktado de la unuiĝprezidanto Mavro Špicer kaj de la vicprezidantino Danica de Bedeković ...”

Ankaŭ en la teksto de Danica Bedeković do estis menciita la dua poŝtkarto de Zamenhof sendita al Špicer, kaj tiu estis skribita la 29-an de decembro 1908. Ĉar ankaŭ s-ino Bedeković konfirmis, ke tiu poŝtkarto estis sendita post la unua ĉefkunveno, klaras, ke tiu ĉefkunveno okazis la 28-an de decembro 1908. Ankaŭ ŝi menciis, ke kelkajn tagojn (precize 5 tagojn!) post tiu ĉefkunveno la kurson gvidis Špicer kaj ŝi mem (kaj ankaŭ laŭ aserto de s-ino Bedeković, ili jam tiam estis nomitaj prezidanto kaj

vicprezidantino). El tiu aserto do sekvas, ke ŝi konfirmis la aserton de Špicer, sed ŝi konfuziĝis pri la datoj.

Nekonsekvenca estas ankaŭ daŭrigo de ŝia teksto en KE, p. 6, en kiu ŝi menciis okazigon de “la unua ĉefkunveno”, kiu laŭ tiu tekstoparto okazis la 28-an de marto 1909! Do, la ĉefkunveno okazinta la 28-an de decembro 1908 estis la fondkunveno, la ĉefkunveno okazinta la 28-an de marto 1909 estis la unua orda ĉefkunveno. Ankaŭ tiun ĉefkunvenon malfermis per sia parolado **prezidanto** Mavro Špicer, kaj dum tiu ĉefkunveno okazis la “definitiva elekto de la unuiĝkomitato” (prezidanto: Špicer, vicprezidantino: Bedeković ktp).

El la originalaj dokumentoj kiuj konfirmas la tezojn el la ĉi-supra teksto, ekzistas nenio, krom la numero sub kiu la landa administracio konfirmis la statuton de la Unuiĝo kaj notis ĝian ekziston. Tiu dokumento estas menciata en la dokumentoj pri oficiala registriĝo de Zagreba Esperantista Societo (en 1919) en la tekstoparto per kiu fariĝas malvalidaj dokumentoj de la antaŭmilita Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj, kiujn akceptis la reĝa landa registaro la 27-an de februaro 1909 sub la numero 8907. Necesus serĉi en la ŝtataj arkivoj tiun dokumenton, por vidi ĉu ekzistas aliaj aldonaj (statuto, protokolo de la fondkunveno ktp). Sed, la dato 27-a de februaro instigas pensi pri simileco kun 28-a de decembro. Povas esti ke la laŭleĝa daŭro por konfirmo de la fondiĝo devis esti tiutempe 60 tagojn, kaj la dato de tiu dokumento aperas precize antaŭ plenumiĝo de tiu periodo.

Kia ajn estas la vero, la 28-a de decembro 1908 estis turnopunkto, post kio Esperanto en Kroatio estis ne nur ŝatokupo de Špicer, sed organizita aktiveco de pli granda grupo de zagrebaj civitanoj, kun akcento pri tutlanda influo de UKĖ.



**Membroj de Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj fotitaj en 1911, kiam la organizaĵo jam travivadis siajn malfacilajn momentojn**



# TRATEMPA VOJAĜO AL LA JARO 1908

 Radenko Milošević

Preskaŭ unu jarcenton retrorigardi?!  
Kia estis la tiama mondo? Kaj Zagrebo? Ĉu  
io postrestis en la "komuna memoro de la  
mondo"? Ĉu eble ankaŭ ni, nuntempaj kroataj  
esperantistoj "heredos" ion el tiu tempo?  
Ni vojaĝu tratempe en la pasintecon kaj  
"trafoliumu" la tiamajn eventojn: malgrandajn,  
pli grandajn, grandegajn...


## Gravaj eventoj en la mondo ...



Nova modo  
venis en la mondon!  
Laŭ ĉi-apuda  
desegnaĵo oni povas  
imagi la aspekton de  
t.n. „Merveilleuse-  
Kleider“. Videblas  
ŝanĝoj en inaj  
korpolinioj. Kvankam  
la bustoj estas  
ankoraŭ akcentitaj,  
la aliaj partoj ne plu  
havas tiom elstaran  
lokon.

Ĝi estis la jaro de Olimpiaj ludoj en  
Londono.

Oni subskribis kontrakton inter  
"Bagdadtrajno" entrepreno kaj la turka registaro  
pri konstruado de 840 kilometrojn longa  
fervojlino ĝis Halif en Proksima Oriento.



Tiujare mortis pentristo kaj desegnisto  
Wilhelm Busch, kies nomo la plej junajn el  
la "cibernet-spaca generacio", memorigas pri  
nenio! Temen, la maljunaj memoras lin pro la

du ŝercemuloj, Max kaj Moritz, kies ŝercoj kaj  
aventuroj estis mondfamaj. Apenaŭ ekzistas  
junularaj bildstriaĵaj ĵurnaloj kie ili ne gastis!

Samjare naskiĝis multaj famuloj:  
franca verkistino Simone de Beauvoir, itala  
verkisto Giovanni Guareschi, fama pro siaj  
romanoj pri Don Camillo, verkisto usona  
William Saroyan, geaktoroj Anna Magnani  
(itala), Joan Crawford, Bette Davis, James  
Stewart (usonaj) kaj ĉilia politikisto Salvador  
Allende.

Multaj aliaj estis naskitaj tiujare: fama  
aŭstra direktisto Herbert von Karajan (Novjaraj  
koncertoj el Vieno!) kaj la rusa violonisto  
David Oistrach, politikisto kaj longjara diktatoro  
albana Enver Hoxha, kaj fama germana  
entreprenisto Max Grundig.

En decembro tiujara, samtage  
kiam estis formita la fundamento de kroata  
Esperantujo, la 28-an de decembro, trafis la  
sudan Italion terura tertremo, kiu forprenis  
cent mil vivojn!

Samjare, kiam Zagrebo kaj zagrebanoj  
eniris Esperantujon, estis fondita, dum la  
4-a Universala Kongreso de Esperanto en  
Dresden, la plej grava organizaĵo de Esperanto  
- Universala Esperanto-Asocio.

## ... kaj en Zagrebo

Samtempe kun disflorado de  
Esperanto-ideo en Kroatio, la duan fojon la  
urbestro elektaĵis s-ro Milan Amruš (1904-  
1910). Lian nomon ĝis hodiaŭ portas la strato  
tutmonde konata laŭ sidejo de Esperanto-  
movado en Zagrebo kaj Kroatio dum duona  
jarcento.

En Zagrebo tiam vivis iom malpli ol  
79.000 loĝantoj. La katastrofa ekonomia stato,  
elmigrado al Ameriko (ĉirkaŭ 15.000 homoj

jare) kaj amasa enmigro de germanoj kaj hungaroj (laŭ la gazeto "Obzor") dum multaj jaroj, rezultis tiam demografiajn ŝanĝojn, ke la mortkvanto de novnaskitaj kroatoj estis inter la plej altaj en Eŭropo.

Gravaj eventoj en Zagrebo estis ankaŭ regulado de Kaptol (parto de Malnova urbo de Zagrebo), por kio la unuan premion ricevis la fama arkitekto Viktor Kovačić, laŭ kies projekto oni konstruis en Zagrebo la preĝejon de Sankta Blaž (=Blasio), la konstruaĵojn de Nacia banko, Placon de Granduloj ktp.

Verkistoj kaj pentristoj revivigis artan vivon de Zagrebo. Tiam komenciĝis publikigo de la plej fama verko de kroata historio, aparte de la kroata kultura historio: "Kontribuoj por kroata jura - historia vortaro" de Vladimir Mažuranić. Poeto Silvije Strahimir Kranjčević verkis la poemojn "Portreto" (Portret), "Mi pensis" (Ja mišljah) kaj aliajn, dum verkisto Antun Gustav Matoš revenis post sia dektrijara ekzilo al Kroatio, pro amnestio okaze de la duonjarcenta regado de Franz-Joseph, aŭstri-hungara imperiestro kaj kroata reĝo.

Pentristoj Josip Račić kaj Miroslav Kraljević foriris al Parizo, kie ili konatigis kun novaj artaj ideoj en postimpresionisma periodo. Junaj pentristoj, plejparte devenantaj el Dalmatio, fondis societon "Medulic", por kies prezidanto estis elektita pentristo Vlaho Bukovac, kiu inter aliaj majstroverkoj, pentris



## Kion prezentas la foto?


Sendinton de plej trafa respondo ni premios per Esperanto-libro! Viajn respondojn sendu al la redakcio.

la solenan kurtenon por Kroata nacia teatro sub la nomo „Nacia renaskiĝo“, kie estis prezentitaj la plej elstaraj partoprenintoj de tiu movado.

## La komenco

La centjara jubileo de organizita aparteno de kroataj esperantistoj al Esperantujo havas elstarajn radikoj:

- (i) ĉe "Osijeka kvinopo de esperantistoj" el la jaro 1889,
- (ii) en la jaro 1905 en Zagrebo aperis kiel esperantistoj Bogdan Vulaković kaj d-ro Vladimir Vidrić, kroata poeto
- (iii) en Rijeka, laŭ la tagĵurnalo "Riečki novi list" de la 3-a de oktobro 1907 estis konstituita esperantista grupo sub la nomo "Adriatika Ligo Esperantista", sabaton la 28-an de septembro 1907



Lernolibro de Spelin kaj Tomo Maretić

(iv) antaŭesperantistaj eventoj: Juraj Bauer en la jaro 1888 faris projekton de artefarita lingvo nomita "spelin" kaj la 10-an de decembro 1891 akademiano Tomo Maretić legis ĉe la solena kunsido de Akademio pri scienco kaj artoj la verkon: "Pensoj pri artefarita monda lingvo", traktinte kaj akcentinte Esperanton

(v) ni menciis ankaŭ Jean Borel, kiu publikigis en sia lernolibro: "Vollstaendiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache", en la sepa eldono en la jaro 1907 la poemon de kroata poeto Petar Preradović "Nokta poemo", tradukitan en Esperanton de K. Koller.

*Per tio ni enpaŝu en la duan jarcenton ...*



# CENTJARIĜO DE ESPERANTO EN KROATIO

 Radenko Milošević

Cent jaroj de Esperanto-movado devus esti granda kaj solena evento por kroataj esperantistoj. Tiu ĉi altvalora datreveno havas siajn radikojn kelkajn jarojn pli frue, kiam sporade aperis la kvinopo de osijekaj esperantistinoj (notitaj en la Zamenhofa adresaro en 1889), esperantistoj Bogdan Vulaković kaj d-ro Vladimir Vidrić en Zagrebo, "Adriatika Ligo Esperantista" en Rijeka en 1907, sed ankaŭ pli frue per apero de lingva projekto "spelin" de Juraj Bauer (1888) kaj la fama parolado de Tomo Maretić en Akademio pri scienco kaj artoj en Zagrebo.

Esperantujo anonciĝis al Zagrebo kaj al Kroatio en 1908, per apero de kroatingva artikolo "Esperanto" de Mavro Špicer en la gazeto "Obzor".

Kiel membro de la Organiza komitato por festo de la 100-jariĝo, laŭ la konkludo de la prezidantaro de Kroata Esperanto-Ligo, mi sentas min devigata prezenti publike la jenan

## Proponon:

Ĉar KEL okazigis sian 7-an kongreson en 2005, la 8-a kongreso estu proklamita la jam anoncita aranĝo en Rijeka ĉi-jare, kaj la 9-a okazu en 2008/2009 (ĉe jarŝanĝo). Ni organizu la kongreson kaj la jubilean feston en decembro 2008, okaze de Zamenhofa tago. La 13-an aŭ 20-an de decembro okazu solena KEL-kunsido, kiel la dua fazo. La unua fazo estu la kongresa parto kelkajn tagojn aŭ maksimume unu semajnon pli frue.

Ni dividu la jubileon kaj la kongreson en tri programpartojn:

(a) Solena kunsido "Cent jaroj de Esperanto en Kroatio". Ĝi okazu en *Starogradska vijećnica* kun abunda solena programo.

(b) Kongresa parto laŭ elektitaj temoj (eble lige kun novaj libroj, problemoj de interlingvistiko, rolo de Esperanto kiel pontlingvo de niaj kulturo kaj artoj). Mi proponas la jenajn programerojn: prelego "Pri 100-a jubileo de Esperanto en Kroatio kaj Zagrebo", lingvistika kaj interlingvistika rondo "Esperanto, Eŭropa Unio, Kroatio kaj lingvaj

problemoj", prelego "Per la latina hieraŭ kaj per Esperanto hodiaŭ por la kroata lingvo".

(c) Aldonaj programoj: prezento de "Historio de Esperanto en Kroatio" (J. Pleadin) kaj pliampleksigita eldono de "Esperanto en literaturo kaj politika vivo de Kroatio", prezento de tekstoj verkitaj de d-ro V. Piškorec pri J. Bauer kaj M. Špicer kun laŭebla libroforma apero, recitado de poemtradukoj pri Kroatio kaj Zagrebo en Esperanton realigota de nia aktorino V. Jerman, programoj sub provizoraj titoloj "Esperantistoj en arto, dramo ktp" kaj "Junaj per kaj kun Esperanto".


Restas kromaj taskoj: sendi anoncan leteron pri la jubileo al oficejoj de la prezidento, Parlamento, Registaro, ministerioj kaj urbaj aŭtoritatoj (eble ankaŭ al pli grandaj urboj kaj departementoj), sendi leterojn al Esperanto-asocioj de najbaraj landoj kaj eksjugoslavaj respublikoj invitante ilin al la jubilea kaj kongresa partoj kaj al kunlaboro, okazigo de preskonferenco(j), verkado de tekstoj kaj felietonoj en tagĵurnaloj, semajnaj gazetoj, radio kaj televido, presado de afiŝoj kaj flugfolioj, dezajnado de jubilea insigno, starigo de ekspozicioj en Nacia kaj universiteta biblioteko kaj en aliaj bibliotekoj kaj librovendejoj, eldonoj filatelie (speciala poŝtmarko), numismatika (jubilea monero), eldono de kompaktdisko, provo ricevi ĉe la urbaj aŭtoritatoj stratnomon dediĉitan al elstaraj esperantistoj (M.Špicer, D.Bedeković, E.Lapenna).

Kompreneble, restis la plej tikla parto – la necesaj financaj rimedoj. Ankaŭ tiu temo devas eniri la laborprogramon de Kroata Esperanto-Ligo por 2008.



## Eŭropa Unio - kroata strategia celo INTERTRAKTADO DAŬRAS

 Snježana Habulin



Eŭropa Unio estas unika integraĵo en la nuntempa mondo, kiu, diference de la ceteraj grandaj, pure ekonomiaj integraĵoj, la nordamerika, sudamerika aŭ ASEAN, sian integriĝon starigis eĉ politike, sence al formiĝo de forta Eŭropo kaj plej granda mondpotenco, kiel tion difinis ĝia Lisbona deklaro el la jaro 2000. Kaj al tiu granda eŭropa familio, al kiu post la kvina fazo de plivastiĝo aliĝis 27 landoj kun proksimume 480 milionoj da loĝantoj, deziras aliĝi ankaŭ Kroatio, kio fariĝis eĉ ĝia strategia celo. Granda paŝo en ties atingo estis farita en 2005, kiam komenciĝis intertraktado kun Eŭropa Unio pri aliĝo de Kroatio al ĝia plenrajta membreco. La intertraktado daŭras, kaj laŭprognose ĝi finiĝos en 2008. Nome, laŭespere, ĝis tiam povus realiĝi la akordiĝo de la kroata leĝdonado kun la juraj atingiĝoj de Eŭropa Unio, kiel antaŭkondiĉo por la plenrajta integriĝo. Decido pri la aliĝo mem, aliflanke, venos el la politika nivelo. Ĉio dependos pri tio, ĉu la landoj-membroj de la Unio intensigos siajn interakordiĝojn kaj akceptos Kroation en pli aŭ malpli longa periodo. Ĉi-momente malfacilas tion respondi, sed sendube Kroatio fariĝos la 28-a lando-membro de Eŭropa Unio.

Ke la kroata celo devas esti aliĝo al Eŭropa Unio, enlande ekzistas vasta politika konsento, konfirmata la 21-an de februaro

2003 per prezento de postulo de Kroatio pri la membreco en Eŭropa Unio, post kio en aprilo 2004 Eŭropa komisiono akceptis pozitivan Opinion pri ĝia postulo, kaj la 18-an de junio samjare Respubliko Koratio ricevis statuson de kandidato por membreco en la Unio. Marte 2005 Konsilio de Eŭropa Unio akceptis la Intertraktan kadron por diskuti kun Kroatio, kaj post la politikaj decidoj de Eŭropa konsilio el junio kaj decembro 2004 pri starto de intertraktado kaj kunvoko de duflanka interregistara konferenco pri aliĝo la intertraktado formale komenciĝis la 3-an de oktobro 2005 per okazigo de la unua kunsido de la interregistara konferenco. Per ricevo de la unua pozitiva opinio de Eŭropa komisiono, kaj poste de la pozitivaj decidoj de Konsilio de ministroj kaj Eŭropa konsilio, Kroatio faris grandan progreson survoje al aliĝo al Eŭropa Unio. Interterpe finiĝis fazo de analiza inspekto kaj takso de akordiĝoj de la nacia leĝdonado kun juraj atingiĝoj de Eŭropa Unio, pli konata kiel *screening*, kun 33 ĉapitroj. *Screening*-oj, pli-malpli, estis laŭplane faritaj, post kio sekvis fazo de opiniprezento de Eŭropa komisiono pri ĉiuj el li, respektive taksado de akordiĝo de la kroata leĝdonado, kio ĝis nun estas finita por 29 ĉapitroj. Konsilio de Eŭropa Unio post tio faris decidon pri starto kaj kriterioj por starto de intertraktoj rilate al







24 ĉapitroj. Akorde kun la evoluo de intertrakta proceso, Kroatio intertempe preparis la starpunktojn por traktado pri 14 ĉapitroj de juraj atingaĵoj, kaj Konsilio de Eŭropa Unio akceptis la komunajn starpunktojn de la Unio por malfermo de 6 ĉapitroj. Portempe estas fermitaj la ĉapitroj "Scienco kaj esplorado" kaj "Edukado kaj kulturo", dum daŭras fazo pri opiniprezento pri plenumo de devoj kaj kriterioj por fermo de ankoraŭ kvar ĉapitroj: "Ekonomia kaj monpolitiko", "Rajto pri intelekta posedaĵo", "Dogana unio" kaj "Entreprenado kaj industria politiko". Kiam la intertraktadoj portempe fermiĝos en ĉiuj ĉapitroj, por Kroatio tio signifos, ke ĝi plenumis ĉiujn kondiĉojn kaj regulojn de la klubo nomata Eŭropa Unio, sekve ĝiaj juraj atingaĵoj, direktivoj, rekomendoj, rezolucioj. Sed, ĝis la definitiva etapo de integriĝo, kiu inkluzivas kontrakton pri aliĝo, proceson de ĝia konfirmado flanke de ĉiuj landoj-membroj, kaj okazigon de referendumo enlande, ankoraŭ tre grandas la farendadoj, sed, kiel oni akcentas, Kroatio tute certe plenumos ĉiujn kondiĉojn, starigitajn antaŭ ĝin de Eŭropa komisiono, kaj ĉion ĉi ne nur pro Eŭropo, sed ankraŭ pro si mem, ĉar ĝia celo estas fariĝi civilizita lando, jure reguligita laŭ altaj kriterioj.

Enkadre de aliĝo al Eŭropa Unio, Kroatio kiel prioritaton vidas, aparte en ekonomia plano, aligon de konkureneco de sia industrio, investadon en teknologian renovigon, enkondukon de novaj scioj kaj programoj, kreon de entrepreniga medio, sekvata de respektiva jura regulado konforme al la eŭropaj kriterioj, kaj la ekonomian kreskon mezureblan per kresko de BNP

(butto nacia produktado) kaj per vivkvalito. Ĝia ĝenerala celo estas kreo de sci-socio. En tiu evoluvojo, kiel parto de antaŭaliĝa etapo de integriĝo al Eŭropa Unio, helpas ankaŭ la eŭropaj fondusoj malfermitaj por kandidataj landoj. Cetere, al Kroatio en 2006 el antaŭaliĝaj fondusoj estis dediĉitaj sume ĉirkaŭ 140 milionoj da eŭroj por helpo, kaj la sumo antaŭvidita por ĉi-tiu jaro, enkadre de la unueca IPA-programo de la Unio, egalas al 155 milionoj da eŭroj. Post aliĝo al Eŭropa Unio, por Kroatio malfermiĝos ankaŭ strukturaj kaj koheziaj fondusoj dediĉitaj al landoj-membroj, kaj ĝis tiam ĝi povos kunlabori ankaŭ en 25 programoj de la Unio dediĉitaj al landoj-kandidatoj. Unu el ili estas ankaŭ la Sesa kadra programo por esplorado kaj evoluo, al kiu Kroatio jam aliĝis kaj kies financoj estas la triaj laŭ grandeco el la budĝeto de Eŭropa Unio. Resume, Kroatio taksis sian evoluŝancon enkadre de Eŭropa Unio, kaj kiel lando, verdire malgranda aree kaj loĝantare, sed havanta grandajn eblecojn, ĝi ne havas kialon, pro kiu Eŭropa Unio malakceptus ĝin en sia sino. Kompreneble, tiun vojon grave malfaciligas la cirkonstancoj en la Unio mem, kiu troviĝas antaŭ granda demando de propra estonteco, speciale de sia ordigo kaj gvidado. Kio estas la estonta Eŭropo, kaj kiel ĝi devus funkcii, restas malfermita demando, al kiu troveblas respondo nur en la eŭropa stabo, sed tio estas aparta temo, kiu, laŭ la kroataj esperoj ne estos kaŭzo de malakcepto de ĝia aliĝo al Eŭropa Unio.

### RETPAĜO PRI IVO LAPENNA

En la historio de Esperanto, ne nur landnivele, la personeco de Ivo Lapenna estas neevitebla kolono. Dum sia vivo li estis motoro de Universala Esperanto-Asocio. En Interreto aperis antaŭ iom da tempo aparte interesa retpaĝo, kiu prezentas lian multfacetan vivon per tekstoj, fotoj, komentoj kaj sonoj. Bonvolu rigardi:  
[www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org).

# PROONO DE PROCEDO POR ENKONDUKO DE ESPERANTO KIEL OFICIALA LINGVO EN EŬROPAN UNION

Dum la 7-a kongreso de kroataj esperantistoj, okazinta la 18-an kaj 19-an de junio 2005 en Zabok, Respubliko Kroatio, estis akceptita la decido, ke Kroata Esperanto-Ligo sendu ĉi-tiu Proponon al plua pritrakto al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj de la ŝtatoj-membroj de Eŭropa Unio, samkiel al Esperanto-organizaĵoj de ŝtatoj-kandidatoj: Bulgario, Rumanio kaj Kroatio.

Per strebado al ekonomia kaj mon-unio kiel antaŭkondiĉo por unueco de var-mona merkato kaj fluo de laborforto kaj kapitalo, estis enkondukita unueca eŭropa valuto - eŭro. Ekzisto de tia unueca valuto en plejmulto el la membroŝtatoj de Eŭropa Unio, donas instigon por nova provo, kies celo estus pli racia funkciado de la Unio kaj pli egalrajta partopreno de ĉiuj ŝtatoj-membroj, nome per enkonduko de Esperanto kiel unu elinter la oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio.

Procedo de kreo de la oficiala lingvo, kiu estas oficiala en neniu ŝtato-membro de Eŭropa Unio, ĉar post aliĝo de unuopa ŝtato al la membraro de Eŭropa Unio ĝi alportas sian nacian lingvon inter la jam ekzistantajn

oficialajn lingvojn de Eŭropa unio, devas esti efektivigita laŭ modelo de la procedo por enkonduko de la unueca valuto eŭro en Eŭropa Unio. Ĉar la procedo de enkonduko de la unueca valuto en plej multaj ŝtatoj-membroj de Eŭropa Unio daŭris iom pli ol 30 jarojn, kaj ankoraŭ ĝi ne estas akceptita de ĉiuj membroj, estas necese por enkonduko de Esperanto preskribi pli facilan procedon, kiun ni proponas en fundamentaj fazoj kiel sekvas:

1. Fondi respektivan eŭropan komisionon por gvidi la procedon de enkonduko de Esperanto kiel unu inter oficialaj eŭropaj lingvoj.

2. Unuopaj ŝtatoj akceptu aŭtonomajn decidojn pri aliĝo al la procedo de enkonduko laŭ reguloj de la Unio por enkonduko de Esperanto kiel unu el la oficialaj lingvoj de la Unio kaj sendu sian decidon de la parlamento al respektiva instanco de la Unio.

3. Iom post iom laŭleĝe realiĝu eblecoj por ke unuopaj funkciuloj kaj oficistoj de la Unio parolu kaj uzu Esperanton, kio faros spacon por enkonduko de pluraj tradukistoj, kiuj estas bonaj spertuloj pri Esperanto.

4. Samtempe estu kompilitaj komputiligitaj vortaroj Esperanto-nacilingvaj kaj inversaj, kio ebligos pere de Esperanto, kiel pontolingvo harmoniigon kaj samsignifigon de ĉiuj uzitaj terminoj. Por ĉi tiu fazo gravas mencii, ke ĝi devas esti "neperforta fazo", dum kiu ankaŭ plue ĉiu povas uzi la propran nacian lingvon en senpera kaj alia komunikado, sed ankaŭ uzado de Esperanto estas permesata.

5. Ĉiuj leĝoj, tekstoj, kontraktoj kaj aliaĵoj, kiel ekz.: leĝaj preskriboj, ekonomiaj statistikaĵoj ktp. estu publikigataj ankaŭ en Esperanto.

6. Kaj fine, la kompetenta organo de Eŭropa Unio akceptu decidon, ke ĉiu skriba komunikado, krom en naciaj lingvoj, havu devige samspecan tekston ankaŭ en Esperanto, kaj ke Esperanto estas unu el la oficialaj lingvoj de la Unio.





# VERONIKA DE DESINIĆ

*Radenko Milošević*

La legendo pri Veronika de Desinić estas unu el inter multaj en la mondo pri malpermesitaj amoj, simila al tiu pri Romeo kaj Julia aŭ tiu, priskribita en la opereto „Madame Butterfly“.

En pitoreska vilaĝeto Desinić montsube de la kastelo Veliki Tabor, en la dekkvina jarcento vivis bela vilaĝanino Veronika. La kastelon mastrumis potenca banuso de Kroatio, grafo Herman la Dua de Celje, samtempe eŭropa potenculo.

Junaj kaj belstatura lia filo Friedrich, rajdinte tra la patra bieno, ekvidis la belulinon. Li tuj enamiĝis. La amindumado de la gejunuloj ne tro plaĉis al la patro, kiu kontraŭstaris ilian amon. La junaj geamantoj persisti kaj fuĝis al la kastelo Friedrichstein en Slovenio, proksime de la limo al Kroatio, en regiono de Gorski Kotar. La bela kastelo kun siaj muroj estis konstruita kiel ĉasadomo por la junulo, pro kio ĝi ricevis anakŭ la nomon.

En la kastelo protektita per dikaj muroj, ĉirkaŭita per bela naturo kaj riĉeco da sovaĝaj bestoj kaj birdoj, la geamantoj okazigis sian geedziĝan feston. Bedaŭrinde, ilia feliĉo ne daŭris longe.

Kiam la maljuna grafo Herman eksciis kio okazis kaj kie estas lia filo, li tuj sendis soldataron kun la ordono ke ili kaptu la junajn geamantojn. La soldatoj ĉirkaŭis la kastelon Friedrichstein, sed Friedrich sekcesis savi Veronika, sendinte ŝin tra Gorski Kotar kaj trans la rivero Kupa al la nordkroata monto Kalnik. Tie, en la vilaĝeto Sankta Margita, Veronika kaŝiĝis ĉe vilaĝano, ĉe kiu multfoje eĉ Friedrich tranoktadis dum ĉasadoj.

La soldatoj kaptis post kelkaj tagoj Friedrich kaj revenigis lin al Veliki Tabor. La kolera patro ne volis vidi la filon, sed

ordonis, ke oni fermu lin en iu tre alta nevasta sentegmenta turo apud la urbo Celje. La pordo kaj fenestroj, tuj poste estis enmasonitaj kaj nur tra mallarĝa truon oni povas al li enĵeti manĝaĵon en la ĉelon. Tie Friedrich travivis kvar jarojn, post kiam la patro liberigis lin. Bedaŭrinde, post la liberigo, la junulo psike kaj fizike estis frakasita. Pri li oni nenion plu scias.

Ankaŭ Veronika ne havis feliĉon. La spionoj de Herman eksciis kie ŝi kaŝiĝis, kaj ŝi estis kaptita kaj eskortita al la kastelo, kie ŝi estis enprizonigita en malgranda senfenestra ĉelo.

La banuso Herman tuj kunvokis la tribunalon, akuzinte Veronika kiel sorĉistinon, kiu pekigis lian filon. La juĝistoj esplordemandadis la povran Veronika dum du tagoj. Ĉe la fino la juĝistoj proklamis, ke ili ne trovis ian ajn pekon nek krimon. Ili diris al la banuso, ke ŝia nura peko estas amo al lia filo Friedrich, kio ja estas la plej bela homa virto.

Malgraŭ tia juĝo, la grafo Herman ordonis al sia kastelmastro tuj mortigi Veronika. La subuloj de Herman metis en la centron de la kastelo grandan lignan tinon kun akvo, kaj enŝovis kapon de Veronika ĝis la lasta spiro. La mortan korpon oni enmasonigis en la supra etaĝo de la kastelo.

Laŭ onidiro, dum vintraj tempestaj noktoj kun krioj de strigo aŭdiĝas ankaŭ plorsingultoj de Veronika de Desinić.

Dum restaŭrado de la kastelo en la jaro 1982 estis trovita kranio de ina persono, eble ĝuste de la povra Veronika!

La tragedian amon de la du gejunuloj - Veronika kaj Friedrich, priskribis en sia verko "Zagorska ruĝa" (La rozo de Zagorje) Hinko Davile, kaj nia titolpaĝa foto instigu vin viziti la kastelon Veliki Tabor en regiono de Zagorje.

Nesufiĉe konata ZEO en Kroatio

# HOTELO

 Josip Pleadin

# "ESPERANTO"



LA LOKO:

Selce situas ĉe bordo de Adriatiko, 3 km sudoriente de Crikvenica. La vilaĝo evoluis surloke de la romia setlejo Ad Turres. Ĉefa okupiĝo de ĝiaj 1700 loĝantoj estas turismo.




LA HOTELO:

La hotelo estas tristela, posedata de la familio Horvat. Kvankam en ĝi ne plu estas parolata Esperanto, sian ekeston kaj ekziston ĝi dankas al esperantistoj: polo Grzegorz Sianoŝecki kaj germana judo Erik Salberg

La rusa-pola kuracisto GRZEGORZ SIANOŬECKI (1865-1930), kiu dum la rusa-japana milito servis kiel militkuracisto en rango de regimentestro, estis konvinkita esperantisto, kiu persone konis la aŭtoron de Esperanto, L. Ludovikon Zamenhof. Lia persona vivo estis plena je ŝanĝoj. Post la milito li fondis en Katowice (Pollando) Ginekologian klinikon. En la jaro 1929 li partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto, kaj ekskursante kun la kongresanoj al adriatika marbordo, li trovis sin en Selce, tiu belega ĉeborda vilaĝo, kiu ravis lin. Samjare li tie aĉetis de emerita pastro unuetaĝan domon "Moj mir", alkonstruis ĝian duan etaĝon kaj nomis ĝin "Vilao Esperanto". Bedaŭrinde, jam sekvontjare, la 10-an de aŭgusto 1930, li mortis akcidente en Selce, kie troviĝas ankaŭ lia tombo. La konstruaĵo estis adaptita al moderna pensiono "Esperanto".



La fama libro "Monumente pri Esperanto" notas ekziston de ZEO en Selce: Esperanto-Pensiono, fondita en 1930.



En 1937, vizitinte Ljubljana (Slovenio), pri la pensiono eksciis ERIK SALBERG (1899-1970?), kiu naskiĝis en Germanio, sed elmigris al Vieno en 1928. En Klagenfurt li fariĝis esperantisto en 1937, kaj samjare li elektis la pensionon en Selce kiel sian postan restadlokon. Li ekloĝis tie, kaj laboris kiel pordisto en alia loka hotelo - "Slaven" ĝis la jaro 1962. Tiam li translokiĝis al Primoŝten, kie li ankaŭ mortis. Dum sia restado en Selce li ludis la rolon de neoficiala Esperanto-interpretisto. Li testamentis al Universala Esperanto-Asocio la sumon de 5000 guldenojn, kaj unu ĉambro en la Centra oficejo en Roterdamo portas lian nomon.

Esperanto ne plu estas parolata en la hotelo "Esperanto", sed la traurbaj vojmontriloj plurloke grandlitere reklamas nian lingvon.



"Heroldo de Esperanto" en 1937 plurfoje publikigis reklamon pri "Hotelo Esperanto" en Selce.

Zagrebo estas la ĉefurbo kaj politika, scienca, ekonomia, kultura centro de Respubliko Kroatio. Ĝi estas, kiel poeto skribis iutempe “urbo sur monto, lumturo el kiu elradias neestingebla kaj certa lumo al ĉiuj homoj”. Zagrebo estas unu el la plej malnovaj eŭropaj urboj, kaj ĝiajn malnovajn partojn Gradec kaj Kaptol, oni konsideras plej bone konservitaj malnovaj urbopartoj en Eŭropo. Ĝia historio komenciĝis formale en la jaro 1094 (la plej ofte menciita jaro de historiistoj), kiam estis fondita la Zagreba diocezo. Per "Ora ĉarto" de la kroata-hungara reĝo Bela la Kvara el la jaro 1242, Zagrebo fariĝis libera reĝa urbo. Zagrebo estas vojkruciĝo en kiu enmigrintoj kaj metiistoj el



Meza Eŭropo konstruis fundamenton de nuntempo. Jarcenton post la ricevo de la ĉarto de libera reĝa urbo, Zagrebo ja havis nur tri mil loĝantojn. En la jaro 1557 Zagrebo estis unuafoje menciita kiel kroatia metropolo. Preskaŭ cent jarojn poste, la kroata-hungara reĝo Leopoldo la Unua, en la jaro 1669 per ĉarto atestis al Reĝa akademio rajton de universitato, kaj tiun ĉi privilegion konfirmis Kroatia parlamento – Sabor.

Zagrebo estis la ĉefa trafiknodo en kiu komenciĝis famaj

Radenko Milošević

# ZAGREBO – LA ĈEFURBO

ŝoseoj Karolina, Josefina kaj Luiziana, ĉiuj finiĝantaj ĉe Adritika maro. En la jaro 1862 estis komenco de fervoja trafiko, per malfermo de la unua fervoja linio tra Zagrebo, kiu de Zidani Most (Slovenio) kondukis al Sisak. Ĝi estis ligita kun la linio Vieno – Ljubljana – Triesto. La geografia situo permesis al Zagrebo evoluadon de metio, komerco, kaj pli poste de industria produktado. Inter tre interesaj ekonomiaj aktivecoj troviĝas Zagreba foiro, komenca punkto de negocado kaj alte rangita ekspozicio en la monda foira familio. La unua granda foiro ekzistis en Zagrebo sub la nomo “Foiro de Marko” jam en la jaro 1256. La foiro progresis, kaj en la jaro 1864 Zagreba komerca kaj industria



ĉambro organizis la “Unuan landan ekonomian ekspozicion”. Tamen la oficiala komenco de Zagreba foiro estis en la jaro 1909. Ĝi estis ankaŭ kunfondinto de la Internacia unuiĝo de foiroj en Parizo 1925.

Zagrebo donis al la mondo novajn ideojn, mondfamajn produktojn kaj inventistojn. Pri tio la mondo ofte ne konscias. Zagrebano Slavoljub Eduard Penkala (1871-1922) estas la unua moderna kroata inventisto. Krom multajn aliajn inventaĵojn, en la jaro 1906 li konstruis





mekanikan krajonon kaj fontoplumon, kiu ricevis lian nomon – “penkalo”. En la jaro 1909 li konstruis ankaŭ la unuan duseĝan aeroplanon.

Ĉe la mencio de la vorton “cepelino”, multaj scias, ke ĝi estas senflugila, aŭ konas aron da teknikaj detaloj, sed maloftaj scias ke ĝin inventis zagrebano David Schwartz, konstruisto de aerveturiloj, kies destino similas al destinoj de multaj niaj samlandanoj. Ne havinte monon, lia edzino post lia morto forvendis patenton al grafo Zepelin.

Nuntempe Zagrebo estas kerno de la kroatia ekonomio kun 40% da BNP kaj 23% el la tuta kroatia industria produktado. La zagreba ekonomio tiamaniere signifas grandan financon, komercan kaj eksport-importan koncentriĝon de la tutŝtata ekonomio. Tiel

ĝi grave influas kaj instigas la ŝanĝojn de la enlanda ekonomio. Samtempe, la ekonomiaj kaj sociaj tendencoj de Zagrebo estas ankaŭ tendencoj de Kroatio. Zagrebo estas alloga por deko da urboj kiuj situas ene de 50 kilometra distanco ĉirkaŭ Zagrebo. Laŭ la bazaj indikiloj videblas, ke en Zagrebo koncentriĝis 36% da aktivaj entreprenoj kun 48% da sumaj enspezoj, 55% da profito kaj 39% da dungitoj, kiuj ricevas 46% da ĉiuj salajroj. Tia rolo kaj signifo de



la zagreba ekonomio tamen estas rezulto de multaj publikaj t.e. de la ŝtato kontrolitaj entreprenoj, kiel elektraj, naftaj, ŝoseaj, arbaraj ktp. En Zagrebo funkcias ĉirkaŭ 22.000 entreprenoj kaj proksimume 17.000 metiistoj. En la ekonomia strukturo de la urbo, laŭ enspezo, 34% apartenas al komerco kaj 30% al industrio.






La 12-an de decembro 2006 mortis tragike en Pataya en Tajlando nur 30-aĝa **TAJANA ĆIRIĆ KOVAČEVIĆ**. Zagrebanino, lerninta Esperanton en Studenta Esperanto-Klubo. Partopreninto de la UK en Tel-Avivo. Ŝi estis teknika redaktoro de la libro "Kroataj poetoj de la 20-a jarcento". Lastatempe, pro la edzinigo ŝi forestis el Kroatio. La malĝojiga informo neatendite atingis la kroatan esperantistaron.

La 7-an de majo 2007 mortis en Zagrebo post grava malsano **DANKO REHORIC**, denaska esperantisto. Li naskiĝis la 18-an de februaro 1927 en Zagrebo, studis en la Naturscienca fakultato samurbe kaj laboris en la Instituto "Ruder Bošković". Aktiva kursgvidanto en Esperanto-societo "Bude Borjan" kaj en la Societo de Zagreba Elektra Tramo, preleganto dum pedagogiaj seminarioj en Esperanta kampadejo en Primošten. Aŭtoro de la kongresa insigno de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto, lektoro de Esperanto-tekstoj kaj aktoro en la Drama sekcio de Esperanto-societo "Bude Borjan". Pro la malsano li retiriĝis el la aktiva movada vivo.

## STUDBIBLIOTEKO KAJ ARKIVEJO FORMIĜAS

Per donacoj kaj interŝanĝoj, en Durdevac formiĝas studbiblioteko kaj arkivejo de kroatia Esperanto-movado. Laŭplane ĝi devus oficiale esti prezentita al la publiko lige al la 100-jara jubileo en 2008 aŭ komence de 2009. Nun la kolekto disponas pri ĉirkaŭ 2000 libroj, plurcento da gazetaj jarkolektoj ktp. Detala prezento sekvas en la n-ro 2 de nia gazeto. Ĉiujn donacojn de malnovaj libroj, gazetoj, fotoj, dokumentoj, korespondaĵoj kaj objektoj kiuj rilatas al Esperanto kaj Esperanto-movado ni danke akceptos. Bonvolu kontakti kun la redakcio.

## NIAJ MORTINTOJ



La 8-an de marto 2007 en Zagrebo estis kremaciita unu el la plej malnovaj denaskaj kroataj esperantistoj, **MLADEN KITONIĆ**, filo de ardaĵ malnovaj geesperantistoj Ivan kaj Marija. Li naskiĝis en 1935 en Durdevac, kaj same kiel liaj du fratinoj, li kreskis en familio, kie Esperanto estis endoma lingvo.

## 2 x "kiu"

### Kiu estas la plej aĝa kroata esperantisto?

Renkonte al la 100-jara jubileo de organizita Esperanto-movado en nia lando, ni invitas la plej aĝajn vivantajn esperantistojn en Kroatio kandidatiĝi por jubilea veterana diplomo. En iu el niaj estontaj numeroj, ni publikigos liston de la plej aĝaj samideanoj. Laŭ nia nuna scio, la plej aĝa povus esti la 94-jara **JOSIP VINKOVIĆ** el Koprivnica, kiu naskiĝis la 24-an de januaro 1913 en vilaĝo Virje. Ĉu estas iu pli aĝa?

### Kiu konas la Esperantan stenografion Intersteno?

Disvastigantoj de Intersteno en Kroatio estis juristo Božidar Vančik, konata varaždina aktivulo, kaj lia konstanta kunlaboranto, agronomo Tomo Gregurek el Koprivnica. Pasintjare, savinte la Esperantaĵojn de Gregurek el pere, oni trovis amason da korespondaĵoj kaj liajn taglibrojn (ekde la jaro 1945 ĝis preskaŭ liaj lastaj tagoj), skribitaj per stenografio. Suozeble temas pri miksaĵo de Esperantlingvaj kaj kroatingvaj notoj. Ĉu iu povas deĉifri la notojn? Se ekzistas tia persono, ni petas kontakti nin pere de la redakcia adreso.





## OMAĜE AL VIKTIMOJ DE HOLOKAŬSTO

Kroata Esperanto-Ligo organizis la 13-an de aprilo 2007 en Zamenhof-strato en Zagrebo programon okaze de la 90-jariĝo post morto de L. L. Zamenhof, kaj omaĝe al Memortago pri viktimoj de holokaŭsto. Pri holokaŭsto parolis Jasminka Domaš kaj Spomenka Štimec, dum la aktorino Vida Jerman legis ĉapitrojn el la libro "Zamenhof-strato" de Roman Dobrzyński. Pri la evento raportis tagjurnaloj "Večernji list" (la 14-an de aprilo), "Vjesnik" per du artikoloj (la 12-an kaj la 14-an/15-an de aprilo), la zagreba radio raportis la 13-an de aprilo kaj la televido en sia programo "Okazis je hodiaŭa tago" la 14-an de aprilo detale raportis pri Zamenhof kaj Esperanto.

## KROATA KARAVANO AL LA 92a UK EN JOKOHAMO

Kroata Esperanto-Ligo kunlabore kun Kroata Montgrimpanta Societo "Zanatlija" (Metiisto) el Zagrebo kaj kun la turisma agentejo "Generalturist" organizas karavanon al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo (Japanio). La programo inkluzivas la montgrimpadon sur la monton Fuji, kaj plurajn ekskursojn. La organizanto estas Faruk Islamović, kiu organizis plurajn karavanojn al UK-oj post la zagreba kongreso, kie li estis taskigita pri kongresaj ekskursoj.

## VERKISTA RENKONTIĜO OKAZOS TRADICIE

La jam tradicia 4-a Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj okazos de la 20-a ĝis la 22-a de julio en la bieno Njeguš

de Spomenka Štimec, kun la ĉefa gasto Tomasz Chmielik el Pollando, ĝenerale konata kiel posedanto de eldonejo "Libromondo", la plej fruktodona Esperanta eldonejo laŭ freŝaj statistikoj.

## "POKALO KOSTRENA" OKAZOS EN MAJO

Scion pri Esperanto ankaŭ ĉi-jare prezentos lernantoj el elementaj lernejoj de Kroatio dum la programo "Pokalo Kostrena", kiun tradicie organizas Esperanto-societo en Rijeka. Ĉi-jare ĝi okazos de la 25-a ĝis la 27-a de majo.

## ZAGREBAJ FERVOJISTOJ EN IFEF-KONGRESO

Zagrebaĵ esperantistoj aliĝis ankaŭ al la 59-a Kongreso de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, kiu okazos de la 12-a ĝis la 19-a de majo en Parizo (Francio). Raporton ni publikigos en la 2-a numero de nia gazeto.



## KIAL NE KONGRESO?

Kroataj esperantistoj jam tradicie organizas siajn kongresojn. La 7-a kongreso okazis en Zabok dum junio 2005. La jaro 2006 estis senkongresa, kaj en la kuranta jaro estas planita *renkontiĝo de kroataj esperantistoj* okaze de la 100-jariĝo de Esperanto en Rijeka. Ne estas klare kial kaj kiu decidis, ke ĝi nomiĝu *renkontiĝo* anstataŭ *kongreso*.

Jaro | Beograda, septembro-decembro 2006 | n-ro 1

Kara leganto

Ĝen, en viaj manoj estas la plej nova revuo de la serba esperantistaro. Pasis jaroj, eĉ jardekoj, de kiam ni restis sen la ŝanĝo komunumo en internacia lingvo – ZEPERANTO kaj ĉiuj nova lingvo, kies historio montras la sintezon de multaj hindeŭropaj radikoj kun konstanta intenco pliforti sian lokakon per alifiaj (prefiksoj kaj sufiksoj).

La ideo pri publikigo de tiu ĉi revuo ekzistis inter beogradaj esperantistoj por ŭiligi progno al ĝeneralmendo en Serbio. Alifiake, la plej grava avantaĝo de la lingvo Esperanto estas ankia en konversaciaj kaj skribaj rilatoj inter homoj de ĉiuj mondpartoj.

La neceso por eldonado de nia revuo – interalie – estas pli bona praktiko de la lingvo en multaj kaj diversaj kampoj:

- historio de Esperanto;
- Esperanto-estraro;
- lingvaj demandoj;
- Esperanto – kurso;
- Esperanto – literaturo: poezio, prozo, eseo (originale aŭ tradukita); sercio; amuletaj kaj enigmoj;
- novaĵ libroj-recenzoj;
- Esperanto-kongresoj kaj aliaj okazigoj;
- interretaj opinoj kaj agendoj.

Donante al vi, kara leganto, la unuan numeron de Beograda Verda Stelo kun la prezenta enhavo, ni aludas vian proponon, en la formo leteroj de agendo, kiuj en ĝenerale aldonas publikon.

Ni bonvenas kunlaboron! La ĉefredaktoro

## ANKAŬ BEOGRADAJ ESPERANTISTOJ HAVAS NOVAN GAZETON

Fine de 2006 aperis la unua numero de nova Esperanto-gazeto en Serbio. Temas pri "Beograda Verda Stelo", kiu en sia unua numero sur 52 paĝoj traktas ĉefe kulturajn kaj literaturajn temojn (prozo, poezio, eseo, recenzoj, historio). La gazeto aperos trifoje jare, presita kaj sur kompaktdiskoj. Ĝia ĉefredaktoro estas d-ro Miodrag Stojanović, kaj la redakta komitato konsistas el: Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana Šundeke, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavko Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, Gvozden Sredić, Velibor Simović kaj Milan Olbina, ĉiuj respektindaj serbaj esperantistoj kun multjara pormovada laboro. Teknike redaktas la revuon Adem Jakupović, filo de la forpasinta Mehmed Jakupović, arda esperantisto el Rijeka (Kroatio). Gratulojn al ĉiuj kunlaborantoj.

## "FONTO" ĈESIS APERI

La sola sendependa beletra revuo en Esperanto, "Fonto", ĉesis aperi ekde 2007. Tion jam pasintjare anoncis ĝia eldonanto Gersi Alfredo Bays al kelkaj aŭtoroj. El la reta katalogo de UEA la revuo estis jam forigita. La eldonisto ne deziris publike komenti sian decidon pri la interrompo de la eldonado, sed li esperis, ke la interrompo daŭros nur dum 2007. Laŭ Osmo Buller la ĉesigo de "Fonto" postulas pli seriozan atenton de UEA. "Fonto" aperi ekde oktobro 1980 kaj konsistis el ĉefe literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj, do ĝi ekzistis dum pli ol kvaronjarcenton! Aperis en ĝi, laŭ supraĵa statistiko, preskaŭ milo da noveloj, pli ol du mil poemoj, pluraj teatraĵoj kaj multnombraj recenzoj. La samnoma eldonejo de G. Bays en Chapecó (Brazilo), eldonis ankaŭ multajn elstarajn libroformajn verkojn. Laŭ onidiroj, la revuo suferis je forta malkresko de la abonantaro kaj konstantaj konlaborantoj. Plia problemo ŝajne povus esti la jam ne tute stabila sanstato de la 72-jara eldonisto Bays. Entute, dum 26 jaroj la revuon redaktis William Auld (1980-1987), Daniel Luez (1988-1992) kaj fine Gerrit Berveling (1993-2007). La zorgojn de UEA pro la ĉesigo de "Fonto" klarigas la fakto, ke "Fonto" estis la sola Esperantlingva revuo kiu amplekse kaj ekskluzive publikigis literaturaĵojn, dum la aliaj, kiel ekzemple "Literatura Foiro", "La Ondo

de Esperanto" kaj "La Gazeto" kombinas kun primovadaj informoj kaj reklamas apartajn starpunktojn de siaj eldonantoj, respektive redaktoroj.



## EKDE 2007 APEROS

"BELETRA ALMANAKO"  
Ĉar post malapero de "Fonto", la Movado ne trovis forton por eldoni similan literaturan revuon, ekde 2007 aperos "Beletra Almanako", komence unufoje aŭ dufoje jare kun verŝajna amplekso de inter 120 kaj 160 paĝoj. Tiu informo estas diskonigita komence de la jaro. La eldonadon entreprenis Ulrich Becker de la eldonejo Mondial en Novjorko, kaj la kunlaborantoj de la periodaĵo estos Jorge Camacho (ĉefredaktoro), Probal Daŝgupta kaj István Ert (redaktoroj). Principe, la almanakon oni ne devos aboni, sed povos aĉeti ĝin kiel libron. La almanako, laŭplane, enhavos diversajn rubrikojn, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuoj, leteroj, debato ktp, originale kaj traduke. Laŭ interkonsento kun UEA, ankaŭ la verkoj premiitaj en Belartaj Konkursoj aperos en la "Beletra Almanako". Oficiala retejo de la almanako: <http://www.librejo.com/beletra-almanako/index.html>.

## LA PAPO BONDEZIRIS ESPERANTE

La papo Benedikto la 16-a eldiris paskajn bondezirojn en Esperanto. Kiel la antaŭlasta inter multaj lingvoj, post la maoria kaj antaŭ la latina, aŭdiĝis la paskaj salutvortoj en Esperanto, en la paska dimanĉo la 8-an de aprilo. Ankaŭ ĉi-jare en la placo de Sankta Petro en Vatikano ĉestis grupo da esperantistoj kun verdaj ŝildoj por montri la vorton Esperanto. La nova papo daŭrigas bonan praktikon de sia antaŭulo, Johano Paŭlo la Dua, kiu regule salutadis la esperantistojn en ilia lingvo.



## "ĜANGALO" REAPERIS KUN MALNOVA ENHAVO

La konata retejo "Ĝangalo", kiu forestis dum decembro 2006 por deko da tagoj, revenis intertempe en interretan. Tamen, la enhavo estas malnova, ĉefe de la jaro 2005. Malgraŭ ĝia reveno en interretan, forestas ia ajn informo pri tio, ko okazos pri la retejo, kies vendiĝo estis anoncita en oktobro pasintjarre. Post oktobro la enhavo de "Ĝangalo" ne estis ĝisdatigita, kaj la 10-an de decembro ĝi komplete malŝaltiĝis. Samtempe kun ĝia malapero, komplete malaperis el la reto ankaŭ la alia granda projekto de Flávio Rebello, la reta televido ITV. Ĝia retejo daŭre restas neatingebla. La reapero de "Ĝangalo" efektive sukcesis vendi sian retejon al brazila grupo, kiel li asertis en mesaĝo sendita en novembro 2006 al "Liberla Folio".

BELETRA REVUO  
Ffonto



## NOVA RETEJO - "AMIKUMU"

Tuj post lanĉo de la unua Esperanta laborperejo "Eklaboru.com", la sama teamo, gvidata de Chuck Smith, entreprenis kreon de interkona retejo por esperantistoj, kiu aperis sub la nomo "Amikumus.com". La oficiala lanĉo okazis la 18-an de februaro, ĉar la sekvan tagon komenciĝis Semajno de internacia amikeco.

## PIEDIRANTE TRA LA MONDO

La itala aventuremulo Marino Curnis en januaro 2006 ekmarŝis el Italio al Japanio. Laŭplane, la piedira vojaĝo al Japanio kaj reen daŭros ĝis la jaro 2011. En januaro 2007 li haltis en Irano pro nericevo de vizoj.



## PERBICIKLE AL AŬSTRALIO

Per biciklo al longa vojaĝo de Svislando al Aŭstralio startis la 24-an de junio 2006 el Basel energi-inĝeniero Benno Frauchiger (n. 1975). Pasintan someron (9-11-a de julio 2006) li pasis tra Kroatio. Fine de aprilo 2007 li troviĝas en Malajsio, post biciklitaj 15.000 kilometroj. Benno estas poligloto (germana, franca, angla, nederlanda, Esperanto kaj parte itala, persa kaj finna

lingvoj) kaj okupiĝas pri foto-arto. Lian vojaĝon vi povas sekvi bilde kaj vorte ĉe: <http://www.levelorouge.ch>.

## ONIDIROJ PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN VARSOVIO 2009

La Universala Kongreso de Esperanto en 2009 ne okazos en Varsovio, kiel spekulaciis la onidiroj. Tion decidis la estraro de UEA en sia aprila kunveno. Por okazigo de la UK en 2009 konkurencas du polaj urboj, inter kiuj elektos la nova estraro de UEA en Jokohamo ĉi-somere. Intervjuita de Pola radio, Osmo Buller malkaŝis, ke la Universala Kongreso en 2009 okazos en Pollando, en Bjalistoko aŭ en Poznano.

## ELNA ANONCAS PREMION HARLOW

La Esperanto-Ligo de Norda Ameriko invitas partoprenantojn por literatura konkurso "Premio Harlow", omaĝe al sia multjara aktivulo Don Harlow. La premio estos aljuĝita al gajnintoj de nova ĉiujara konkurso por elstaraj tradukoj de usona literaturo en Esperanton. Partopreni oni povas per traduko de verkoj el la listo trovebla ĉe [www.esperanto-usa.org/node/783](http://www.esperanto-usa.org/node/783).

En la unua jaro temas nur pri usonaj poemoj el la 17-a, 18-a kaj 19-a jarcentoj. En estontaj jaroj la konkurso enhavos ankaŭ la branĉojn por prozo kaj poezio de la 20-a jarcento. La konkursantaj tradukoj devas esti novaj, originalaj kaj neniam antaŭe publikigitaj, ĉu papere, ĉu rete. Ĉiu kontribuinto povas konkursi per ĝis kvin tradukoj. La tradukojn oni sendu al la retadreso [konkurso@esperanto-usa.org](mailto:konkurso@esperanto-usa.org).

Gajnintoj estos anoncigitaj dum la ELNA-Landkongreso en julio 2007.

## NOVAJ MEMBROJ DE AKADEMIO DE ESPERANTO

Ĉiun trian jaron por unu triono el la 45 anoj de Akademio de Esperanto finiĝas la mandato. Estas elektata nova grupo de akademianoj por anstataŭi ilin. En la ĉi-jara elekto estis elektitaj 9 novaj membroj de la akademio, kaj 6 novaj akademianoj. Ĉiu nova membro devis esti proponita de almenaŭ kvin ekzistantaj Akademianoj. Laŭ la interna cirkulero de la Akademio, lanĉita la 19-an de aprilo, por naŭjara oficperiodo estis elektitaj kaj reelektitaj la jenaj personoj: Gerrit Berveling (reelekto), Renato Corsetti (reelekto), Paul Gubbins (nova), Christer Kiselman (reelekto), Ilona Koutny (reelekto), Katalin Kováts (nova), Jouko Lindstedt (reelekto), François Lo Jacomo (reelekto), Mauro La Torre (nova), Geraldo Mattos (reelekto), Brian Moon (reelekto), Ma Young-tae (nova), Barbara Pietrzak (nova), Baldur Ragnarsson (reelekto), Saka Tadasi (nova).

## KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN MARIBOR (SLOVENIO)

Laŭ la diskonigitaj informoj, preparoj por la 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazonta en Maribor (Slovenio) de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007, bone progresas. Aliĝis ĝis nun ducento da personoj el diversaj eŭropaj landoj, sed la organizantoj kalkulas ankaŭ pri multaj lastmomentaj

aliĝoj, ĉar multaj eŭropanoj ne entreprenos longan vojaĝon al la Universala Kongreso en Japanio. Ĝenerala temo de la kongreso estas "Akvo difinas eŭropan estonton de la 21-a jarcento". Detalojn pri la programo kaj elŝuteblajn aliĝilojn kaj hotelmendilojn oni povas trovi ĉe: [www.esperanto-maribor.si](http://www.esperanto-maribor.si).

### **POLA RADIO NE PLU ELSENDAS EN ESPERANTO**

Fine de oktobro pasintjare, skuis la Esperantan publikon la informo, ke baldaŭ ekmutos elsendoj de Pola Radio en Esperanto, kiuj unufoje aperis en 1928 kaj regule estis elsendataj ekde 1959. La planita nuligo okazis komence de 2007, kaj ekde tiam Pola Radio estas aŭdebla nur en interreto: [www.polskieradio.pl/eo/](http://www.polskieradio.pl/eo/). Post la nuligo de la elsendoj, tamen ekestis skandalo, pro kiu estis suspendita la estrarano de la radio Jerzy Targalski, kiu, laŭ la Inspekta Konsilantaro, "ĝenis la publikan bildon de Pola Radio", eldirinte la ideologian argumenton: "Se eĉ Israelo ne elsendas en Esperanto, kial do Pola Radio tion faru? Zamenhof ja estis pollandano, sed de juda deveno".

### **LIBROELDONADO EN ESPERANTO TRA LA MONDO**

Laŭ la statistiko, publikigita de "La Ondo de Esperanto", kiu fontas el la plumo de Aleksander Korĵenkov, la libroeldonado en Esperantujo en 2006 konsiderinde kreskis kompare kun ĉiuj jaroj de post 2003. Laŭ la nomita teksto, en 2006 eldoniĝis 204 diversaj libroj kun

suma paĝnombro de 30.078. La nombro de aperintaj libroj estas komparebla nur kun la jaro 2003, dum la kompareblan suman paĝnombron ni ne atingis post la jaro 2001. Ankaŭ la nombro de la eldonistoj konsiderinde kreskis - estis 114 diversaj eldonistoj, kompare kun 87 en 2005. Kiel la plej aktivaj eldonejoj estas menciitaj "Libro-Mondo" (Pollando), UEA (Nederlando), "Impeto" (Ruslando), "KAVA-PECH" (Ĉeĥio), FEL (Belgio) ktp. La plej aktivaj landoj laŭ eldonitaj titoloj: Pollando (31), Nederlando (17), Italio (16), Ruslando (15), Francio (13), Svislando (11), Brazilo (10) ktp, sed laŭ la paĝnombro la statistiko aspektas jene: Pollando (4684), Italio (2809), Ruslando (2334), Svislando (2233), Nederlando (2000), Germanio (1839), Usono (1656) ktp. Kie en tiuj statistikoj troviĝas Kroatio? Kroata Esperanto-Ligo jam delonge ne okupiĝas regule pri laŭplana eldonado. Sporadajn eldonaĵojn aperigas kelkaj eldonistoj: "Izvori" en Zagrebo, Esperanto-societo "Liberiga Stelo" en Osijek kaj "Grafokom" en Đurđevac. En 2006 aperis nur tri titoloj, kun suma nombro de 382 paĝoj ĉe du eldonistoj.

### **PROBAL DAŜGUPTA KREDEBLA NOVA PREZIDANTO DE UEA**


Probal Daŝgupta el Barato, kredeble estos la sekva prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. La dua oficerperiodo de Renato Corsetti finiĝos en la Jokohama Universala Kongreso dum aŭgusto ĉi-jare. Ĉar ne kandidatiĝis aliaj konkurantoj por la ofico de prezidanto, tre



verŝajne s-ro Daŝgupta fariĝos nova gvidanto de UEA. Li estis preleganto de lingvistiko en tri barataj universitatoj. En la universitato de Hajderabado li estis direktoro (2000-2006) de "Programo por Studi Baraton" por fremdaj studentoj. Li estis ankaŭ en la sama universitato dekanato pri homsciencoj (2001-2004). Ekde 2006 li laboras en la Barata Statistika Instituto. En la Esperanto-movado li aktivis ekde 1977.

### **"ORDENO DE VERDA PLUMO" FURORIS**

Pasintjare prezentita en la Florenca Universala Kongreso, Leksikono pri Esperantlingvaj Verkistoj eldonita en Kroatio sub la titolo "Ordeno de Verda Plumo", laŭ la kongresa Libroservo, estis la naŭa en la listo de plej vendataj libroj (kun 30 venditaj ekzempleroj).



## KARCERE

*Dum longaj jaroj sunon mi ne vidis,  
ne kaŝaŭskultis alaŭdkanton,  
kuntirita  
en la karcer-obskur' kaj en humid' senĉesa  
enkatenita per doloro-ĉen' amara,  
mi sonĝi povis nur pri la aer' alteca  
kaj pri la pura belo nasko-vala.*

*Kaj sentis mi: cent koroj bruste vivas,  
cent junaj birdoj flugi volaj;  
ebria  
de l' sun' kaj forta por ŝton-pez' elmonta  
kaj plenfidanta ŝtormon de la long-batalo  
mi kredis, ke de mia kri' kvietus maro onda  
kaj de la mano falus kverko en arbaro.*

*En mi amsento vastis kiel maro;  
Korvarm' por ĉiuj homoj suferantaj -  
ĝojriĉ'  
por ĉiuj terur-tagoj de l' ĉi esto,  
kompren' por ignoratoj kompatindaj, -  
por tiuj, kiuj vivas kiel besto  
sen iu esper-signo aperinta.*

*Kaj nun? Putrante tie ĉi  
en humidec', mucid' sufoka kaj doloro,  
nenio,  
nenio tiel forte min doloras  
kiel ĉi penso en obskuro tia:  
ke ĉio propra putras kaj pereas,  
kaj nure por persono mia!*

Pluraj Esperantaj tradukoj de poemoj de Ĵuro Sueda estis faritaj per sindediĉa laboro de la forpasinta profesoro **Josip Velebit**. En 1990-aj jaroj li sendis la tradukojn al la redakcio de Esperanto-revuo "Koko". Kvankam nepublikigitaj tiam, la manuskriptoj konserviĝis kaj aperas nun, okaze de la 80-jariĝo post la morto de la poeto.



## ĴURO SUDETA (1903 - 1927)

Kroata verkisto naskiĝinta la 10-an de aprilo 1903 en Stara Ploščica apud Bjelovar. Li estis instruisto en Virje kaj Koprivnica. Apartan influon al lia poezio donis la nekurablebla malsano kaj antaŭseno de la morto, kiu trafis lin en aĝo de 24 jaroj, la 30-an de aprilo 1927 en Koprivnica. Liaj poemoj, artikoloj kaj politikaj diskutoj aperadis en diversaj kroatingvaj gazetoj. Lia poezio estas melankolia, plena je vivdeziro kun sentebla religia noto. Dumvive aperis liaj du poemaroj (1924, respektive 1926) kaj postmorte ankaŭ la tria (1929). El multaj liaj rakontoj elstaras la lirike-fantasta "Mor" (1930).

## FALTREMPAS PLUVO

*Faltrempas varma pluv' bonega,  
mia anim' sepvunda tre doloras:  
plenvoĉe la branĉaro brue sonas,  
freŝspiras gren' malseka ...*

*Vualu ĉambron, ho patrino,  
la ananasodor' sufokas tro kaj pezas,  
jen, manoj mortas, melodi' junvoĉa ĉesas,  
naskoloka vok' ne havas finon.*

*Mi tristas kaj malsanas senmezure,  
okuloj viaj min doloras feblaj ...  
Faltrempas pluv', ĉu helpo plu ne eblas? ...  
Nur iom, panjo, iomete, nure - - -*

## RAKONTO PRI AVO KAJ LIAJ ĈEVALOJ

 Josip Pleadin

Grandvaloraj aferoj en la vivo ĉiam estas la jam delonge pasintaj. Pro ili oni malĝojas, revokas ilin en la memoron kaj ĉiam denove trograndigas ilin, dezirante konservi ilin el poreterna perdiĝo. Oni gardas ilin kvazaŭ juvelon, kvazaŭ sanktajon ... Neniu iam ajn rajtas tuŝi, malpurigi, malvalorigi ilin, neniu rajtas diri ion ajn malbelan pri ili. Ili estas la sankta flamo kiu ĉiam denove vekas la endormiĝintan entuziasmon. Kaj ju pli multe da tempo pasas, ju pli profunde ili troviĝas en la pasinto, kovritaj per pezo de aliaj aferoj, des pli ilia valoro kreskas, ilia brilo pli ebruiĝas, ilia voko pli vivecas. Unu demando tamen restas sen respondo: Kial ni rememoras la banalajn, kaj tiom karajn momentojn el foraj tagoj?

Iutage, al mia memoro venis mia avo Paŭlo, maldika, osteca, kun kalva longa kapo, plene volvita per fumo de cigaredoj, kiuj en senfina sinsekvo, unu post la alia, metiĝis en la angulon de liaj lipoj. Mi vidis lin tiam, sidinta sub riĉbranca juglandarbo meze de la ava korto, tie, kie nun estas eĉ ne spuro pri la trunko kaj la foliriĉa branĉaro. Blanka, per kalko farbita trunko, prezentis bildon de pureco de la ĉirkaŭa korto. La avo sidis sur malalta tripeda seĝo, apogante sin perkubete al la genuoj, li palpebrumis perokule el sub la nigra, malpura ĉapelo, kaj dikaj ŝvitgutoj ruliĝis malsupren laŭ liaj magra vizaĝo kaj nerazita barbo. Somero plenfortis. La suno senkompatate bruligis, kaj la aero tremetis pro la tagmeza varmeĝo. Estis tempo de plej granda kamparana zorgo. Sur eta, rondforma tableto, tra blanka glaso rebrilis kvazaŭ perlo la orkolora vino en la botelo. La avo trinkis nur la puran vinon, li ne miksis ĝin kun mineralakvo, ĉar li bone sciis, ke ne ekzistas tiom malbona vino, ke ĝian guston la akvo plibonigus.

En la proksima stalo, en kiu intermiksiĝis odoroj de ŝvitaj bestkorpaj kaj tro longe kuŝintaj sterko kaj pisajo, tiutage estis nur kelkopo da brutoj. La temperaturo tro altis, kaj la stalo estis konstruita laŭ malnova stilo, malalta, senaera kaj malvasta. Rubi kaj Ŝarga, du brunaj gebeluloj, fiero de la avo Paŭlo, estis ligitaj en ombro de granda morusujo en la alia kortoflanko. Ili staris. La ĉevaloj eĉ kutime ripozis starante, kaj kiu ja kuŝiĝus sur la varmeĝan teron en ĉi tiu tagparto! La bofilo de Paŭlo, kiu el sia laborejo alhastis nur por eta luncpaŭzo, unue trinkigis la lacajn ĉevalojn, forigis de ili la turmentajn muŝojn kaj tabanojn kiuj lante suĉis ilian sangon, kaj nur post tio li havis tempon por si mem. Ĉio okazis laŭ la fiksita ritualo, rapide, sen interkonsentoj. Ĉio jam delonge estis interkonsentita, ĉio sciata kaj ne estis neceso demandi.

En la momento kiam al mi tute vivece fontis la rememoroj pri la avo Paŭlo, eĉ mi mem ne certis pro kio

ĝuste pri li kaj pro kio ĝuste en tiu momento. Mia avo estis vera kamparano, hardita, kun duraj kalozaj manoj, vortavara, fojfoje maldelikata en interhomaj rilatoj ... Sed al siaj ĉevaloj li rilatis kun granda zorgo kaj respekto. Estus nekonvene la posedon de ĉevaloj en tiu tempo kompari kun haveco de bona transportilo en mia epoko, sed simileco certe ekzistas. Al la vilaĝaj fraŭloj la unua celo estis posedi ĉevalon, per ties posedo oni pruvis la enfamilian statuson, situon en la socio, povon kaj posedstaton. Ju pli belis la ĉevaloj, ju pli rasaj, pursangaj, ju pli oni zorgis pri ili kaj montradis ilin, des pli la mastro estis aprezata. Per ĉevalposedo oni pruvis maturecon de personeco, plenkreskon, pretecon edziĝi. Pro tio la junuloj fiere rajdis sur siaj belaj ĉevaloj tra la vilaĝo, aŭ en freneza kurado galopis tra la vilaĝaj stratetoj kaj arbaraj padoj. Pro tio ili pavis en luksaj kaleŝoj aŭ sledoj. Mia avo estis alispeca. Li simple amis la ĉevalojn. Ne pro la prestiĝo, sed pro la sincereco kaj mildeco en iliaj rilatoj al sia mastro.

Mi ne scias kiel Rubi kaj Ŝarga venis en la stalon de avo Paŭlo. Kiu scias kiam da foiroj li vizitis, kiam da agrablaj momentoj li evitis por kolekti sufiĉe da mono por tiaj gebeluloj! Mi nur memoras, ke Rubi kaj Ŝarga ekde mia frua infanaĝo estis konsistiga parto de nia familia hejmo. Frumatene, kuŝante en la lito apud mia patrino kiu senbrue ellitiĝis por ne veki min tiom frue, mi aŭdadis iliajn hufbatojn kiuj eĥis el la stalo, ilian tranĉan henadon per kiu ili vokis la avon strigli kaj nutri ilin. Klare distingiĝis la momento kiam la avo eniris en la stalon. Ilia henado fariĝis pli intensa kaj pli similis la interparolon, frumatenan saluton aŭ ĝojkron pro la apero de la avo figuro en la pordokadro. Longe daŭris la kutima ritualo de striglado kaj lavado. Antaŭ ol ĉio sur la ĉevalpario brelegus, nenio alia estis farenada, nenien oni povis iri kaj ne ekzistis pli grava afero en la mondo. Nur kiam la kolharoj, vosto kaj hufoj estis ordigitaj, nur kiam la ĉevaloj estis sataj, la avo okupiĝis pri la brutaro en la stalo, kaj fine eĉ li mem, plena da elano kaj kontento, eniradis la kuirejon kaj sidiĝis ĉe la preta manĝotablo. Post li eniris odoro de la ĉevalŝvito, dolĉa aromo de stalo, fojno kaj paĵlo.

La saman sorton dividis la avo kaj liaj ĉevaloj dum longa jarvico. El knabeto, kiu pro la timo dormas en la patrino lito, mi elkreskis lernanto, kaj Rubi kaj Ŝarga ankoraŭ estis samloke. La avo dorso kurbigis, jarpezo premis ĝin ĉiam pli kaj pli, kaj la amo inter li kaj liaj samsortanoj ne ŝanĝiĝis. Ili sin komprenis senerare. La vipo en liaj manoj zumis nur super la ĉevalaj dorsoj, neniam dolorigante ilin. Komprenis Rubi kaj Ŝarga kion signifas "ac" kaj kion "tile", komprenis ĉiun vimpuzon super siaj dorsoj, ili sciis kion signifas la malrapida kaj kion la abrupta tiro de bridrimenoj, kiam ili devis halti, kiem ekpaŝi, kiam plenforte tiri, kaj kiam la ebriajn avon transporti el vinberejo rekte antaŭ la domsojlon, sekure kaj senerare. Ili komprenis liajn movojn, lian koleron kaj furiozon, aŭ lian melankolian parolon. Foje, kiam ŝajnis, ke la avo malprudentiĝis monologante, li fakte saĝe interparolis kun siaj kvarpieduloj. Kaj ne temis pri simpla monologo. La ĉevaloj fakte lin tute perfekte komprenis, jesis liajn vortojn per henoj, siblado, kapmovoj, orelmovoj kaj frotado de siaj kolharoj al liaj ŝultroj. Li fojfoje staris antaŭ la timono inter la du brunuloj, apogis la kapon de unu al la maldekstra, kaj la kapon de la alia al la dekstra ŝultro kaj tiel longe paroladis en iliajn orelojn, kaj ili atente aŭskultis lin, same kiel infano mirigita, malfermbuŝa kaj grandokula aŭskultas belan



fabelon.

Samkiom la avo fieris pro siaj ĉevaloj, ŝajnis ke samtiam ili fieris pro li. Dum per eleganta troto ili pasadis tra la vilaĝo, kaj la avo vipsvingis kaj resalutis al la konatoj per mantuŝo de ĉapelrando, la ĉevaloj per altlevitaj kapoj gajmove sed obeeme saltetis, kaj la densaj nigraj kolharoj flirtis en la venteto kiel flagoj. Rubi kaj Ŝarga kvazaŭ volis al la tuta vilaĝo diri: Rigardu, jen nia mastro!

Se la vivo estintus pli kompatema al ili, eble la avo Paŭlo neniam havintus aliajn ĉevalojn. Li estis plene kontenta, ĉar la homoj de tiu epoko eĉ ne bezonis multon por kontentiĝi. Mia avo neniam riĉiĝis, sed li posedis ion nemezureblan per mono kaj havaĵo: li havis koron plenan da amo kaj iun kiu komprenas kaj estimas lin, kia ajn li estis.

Sed, ĉiu fabelo havas sian finon. Nenio eternas kaj ĉiu belaĵo paliĝas kaj malaperas.

Longan jarvicon poste, kiam Rubi kaj Ŝarga jam havis surdorse la pezezan vivoŝarĝon, kiam post ili restis kilometroj da paŝado kaj pezaj kamparaj laboroj, kaj kiam ili ne plu estis kapablaj labori, la avo decidis daŭre zorgi pri ili. La ritualo de kompleta zorgo ne finiĝis eĉ tiam, kiam Rubi kaj Ŝarga la tutajn tagojn pasigis ripozante en la stalo. Ne estis malico, ne estis malamo, li amo daŭre flagris per sama intenso kvazaŭ en tempo de ilia juneco.

Kaj tiam, sur la ventro de Rubi malfermiĝis eta vundo. La avo elprovis ĉiujn eblajn tradicimedicinajn metodojn por sanigi ĝin, sed la progreso forestis. Kiam finfine li venigis veterinaron, malaperis la dilemo. Rubi serioze malsaniĝis. Kancero manĝegis lin samkiel la homojn. Li iris al senreveno.

Unuamomente la avo deziris lasi Rubi vivi tiom longe, kiom la sorto destinis al li. Li decidis dediĉi sian plenan zorgon al li, li travivis lian agonion, ili kundormis en la stalo, li servis lin kiel seriozan malsanulon. Rubi kvazaŭ kompreninte kio okazas, ĉiam pli ofte apogis sian kapon al la ŝultro de la avo, dolore henis kvazaŭ li adiaŭus de la malnova kamarado, kaj en liaj okuloj rebrilis larmoj, kiom ajn nekredibla estis tiu fakto. Dum la avo rigardis profunde en tiujn grandajn malgajajn okulojn, li sciis, ke venas la neevitebla fino. Noktoj kaj tagoj fariĝis ĉiam pli neelteneblaj, Rubi dolore ĝemis, malfortiĝis, stumblis, prancis kaj serĉis helpon. La avo frakasis la manojn, preĝis la Dion, insultis la Dion samkvane, ĉar li deprenas la plej valoran parton de lia vivo, kaj ree li preĝis kaj sakris sen fino. En la plej grandaj doloroj de Rubi li sidis surpajle apud li, tenis lian kapon en sia sino kaj karesis lin senhalte, parolante ali li kuraĝigajn vortojn. Finfine li frakasiĝis sub peza premo de senhelpemo. Laŭ instigo de la familianoj, li invitis ĉevalkomerciston, intencante al Rubi mallongigi la suferojn. Sen ia ajn deziro pri prezmalaltigo, sen marĉando, li akceptis la senhonte malaltan prezon por sia favorato, nur por kiel eble plej rapide senigi lin de la suferoj. Kiam la ŝarĝaŭtomobilo eniris la korton, la tuta familio staris sur la ŝtuparo de la familia domo, senvorte, kvazaŭ adiaŭante de sia membro kiu foriris al vojaĝo sen reveno. La avo ĝemis, larmokule brakumis Rubi, petante lian indulgon pro la faroj kiujn li eĉ en koŝmaro cetere ne povus fari. Per lastaj fortoj Rubi senreziste supreniris en la kamionon. Senforte li kuŝiĝis sur la plankon de la veturilo, turniĝante al la larmvizaĝa foriranta avo. Knarado de la pordo malfermiĝanta post la avo dorso sufokis

la dolorajn ĝemojn de Rubi, kaj la avo per polmoj kovris la orelojn, buliĝis genue sub la juglandarbo en la korto kaj longe restis tia, ĝis la kamiono kun Rubi malaperis trans la vojkruciĝo kun krucifikso. La monbiletojn, kiujn la komercisto lasis sur la tablo sub la juglandarbo, neniu tuŝis dum tagoj. La avo, dolorplene ebriĝadis dum kelkaj semajnoj, vagante sencele. Li ne havis forton por manĝi, sed li senfine vicigis cigaredon post cigaredo kaj verŝis post ili ĉiam pli grandajn kvantojn da vino kaj brando. Dume Ŝarga solecis en la stalo, vokis lin samkiel ĉiun alian tagon, kaj li ne venadis. La familianoj, kiuj neniam pli frue okupiĝis pri la ĉevaloj, devis transpreni ankaŭ tiun taskon, por ke Ŝarga ne mortu pro malsato. Sed, Ŝarga funebriis samkiel la avo. Ŝi ĉiam malplie manĝis, rifuzis akcepti manĝon el alies manoj kaj nur senpacience turnadis la kapon al la enirpordo de la stalo. Estis evidente, ke ankaŭ ŝi ektrotos la vojon kiun Rubi pasis kelkajn semajnojn pli frue.

Eĉ hodiaŭ mi ne certas kio vere okazis. Mi scias nur, ke iun tagon ankaŭ Ŝarga malaperis el nia korto, kaj la stalo restis malplena kvazaŭ forlasita hirundnesto antaŭ vintro. Ne plu vastiĝis la konata aromo de ĉevalŝvito tra la kuirejo dum tempo de matenmanĝo, nek la stalo odoris je freŝa fojno kaj pajla sternajo. Kiom longe daŭris funebro en nia korto, malfacile sciis iu ajn, kredeble ĝi daŭris pli longe ol post iu familiano.

Kaj tiam iun tagon la avo retiriĝis el la sencela drinkado kaj longa tagnokta malĝojo. En la foiro li ekvidis alian ĉevalparon, al kiu kroĉiĝis lia rigardo. Al Rubi kaj Ŝarga ili similis laŭ nenio: nek laŭ la grandioza beleco, nek laŭ la fiero, nek laŭ la prudento per kiu ili komprenadis ĉiun lian movon. Ili estis paro de nebelaj mikrasaj ĉevaloj. Unu estis bruna, mezkreska, kaj la alia griza, malalta, tiel nomata "cigana ĉevalo". Sian loĝejon ili trovis samloke kie iam restadis Rubi kaj Ŝarga. Malgraŭ la fakto, ke la avo en ili trovis kian-tian konsolon, la rilato kiam li havis kun iliaj antaŭuloj, neniam konstruiĝis kun la novaj ĉevaloj. Tra longaj jaroj ankaŭ ili kutimiĝis al specifa rilato kun sia mastro, elkreskis al bone nutritaj kaj flegitaj bestoj. Dum la brunulo restis kia ĝi estis komence, la grizulo iom post iom blankiĝis, ĝuste kvazaŭ ĝi estus lipicano\*. Kaj dum ili jungitaj al kaleŝo ŝajnis trejnita duo, per sia aspekto ili similis komikulojn inter animaloj. La avo ne plu pasadis tra la vilaĝo per troto, nek resalutadis al preterpasantoj per ĉapeluŝo. Sidante sur la ĉara sidbreto, li apogis la kubutojn al la genuoj, dormetis sub la nigra ĉapelo kaj fojfoje vipsvingis super iliaj dorsoj. Kredeble tiam li vivis en iu alia mondo, revis pri la belaj momentoj pasigitaj kun Rubi kaj Ŝarga kaj demandis sin mem, kie tiutempe estis iliaj ĉevalanimoj. Mi ne scias ĉu pro malĝojo aŭ pro senespero, la avo post Rubi kaj Ŝarga foriris antaŭ ties posteuloj, kaj al mi en la memoro eĉ hodiaŭ cirkulas bildoj el la idiliaj tagoj sub la malnova juglandarbo en la familia korto, en kiu hodiaŭ mankas kaj la juglandarbo, kaj la ĉevaloj - kaj mi.

12. 9. 2004.

**ac** kaj **tile** - ordono al la ĉevaloj por iri "maldekstren", respektive "dekstren"

**lipicano** - aŭtoktona ĉevalspecio, ricevinta sian nomon laŭ la vilaĝo Lipica en Slovenio.